Scienca revuo aperis regule de la jaro 1949 ĝis la jaro 2011 en papera formo. La multjara ĉefredaktoro prof. Rüdiger Sachs ekde la jaro 2012 transdonis la taskon al d-ro Johannes Mueller. La estraranoj de ISAE helpas al la nova ĉefredaktoro.

Povi atingi kaj studi la ĝis nun aperintajn tekstmaterialojn estos grava helpo por estontaj aŭtoroj, por ĉiuj interesatoj, kiuj povos konsulti fakartikolojn kaj serĉi por reuzado la jam ekzistantajn fakvortojn.

La celo de Interkultura Centro Herzberg kune kun ISAE estis, disponigi en moderna, elektronike akirebla formo laŭeble ĉiujn ĝisnunajn eldonojn. Dank' al senlaca helpado, bona internacia kunlaboro inter kolektantoj, bibliotekoj kaj helpemaj fakuloj ni sukcesis trovi la fontojn, fari ordon kaj klopodi je eldonado de jarkompletoj (inkluzive de kromkajeroj kaj bultenoj) sur KD. La serĉado, preparado, skanado aŭ/kaj fotado estis multmonata atento-postula laboro, post kio restos ankoraŭ multaj paŝetoj ĝis fina ordigado kaj fajnigado.

Supozeble ankoraŭ en la jaro 2012 ni finos la gravajn laborfazojn, la transigon de datumoj el la lastaj ses jardekoj al komputile legebla, grandparte ankaŭ serĉebla, moderna formato. Pliaj informoj ĉe <http://esperanto-urbo.de/blog.php>.

Junaj turismaj gvidantoj en Esperanto

Jam je la dua fojo okazas per Esperanto ĉe lernejoj en Herzberg t. n. eŭropa projekto Comenius. La loka gimnazio estas la gvidanta projektpartnero. Zsófia Kóródy el Herzberg, kiu jam havas bonajn spertojn sur tiu ĉi kampo, gvidas la internacian projekton.

Gimnazioj en Hungario (urbo Győr) kaj Italio (urbo Mazara Del Vallo) dum la venontaj du jaroj estos la partneraj lernejoj

La intenco estas, instrui estontajn junajn turismajn gvidantojn per la lingvoj angla, Esperanto, germana kaj itala rilate al regionaj turismaj allogaĵoj. Ankaŭ la diversaj kulturoj estas gravaj kaj realaj temoj. La junuloj devos lerni multe, ekz. pri sinprezentadoj, pri la urbo kaj la regiono, pri vidindaĵoj, pri la historio,



surlokaj muzeoj kaj bibliotekoj, migradceloj, ktp. Krome la junuloj interŝanĝos spertojn dum la vizitadoj. Ili lernas memstare ellabori prezentadmaterialojn. Certe ekestos novaj interlernejaj amikecoj ankaŭ dank' al la neŭtrala pontolingvo Esperanto. Okaze de la lanĉo de

la projekto aperis regiona ĵurnalisto por fari grupfoton kun la rektoroj de la gimnazio, kun Zsófia Kóródy, Ewa Kukielka kaj la novaj Comenius-lernantoj. Fiere ili prezentas la novan eŭropan ŝildon pri agnosko, kiun oni trovas nun sur la muro ĉe la enirejo de la gimnazio.

Gießner-benkoj en Herzberg



En la Esperanto-urbo ja okazas multflankaj agadoj en kaj per Esperanto. Publika kaj daŭripova arto estas grava elemento en nia urbo.

Nia amika asocio „Futurateliero“ (Zukunftswerkstatt) havis la ideon, krei benkojn kaj seĝojn por honorifamajn homojn el Herzberg. Kompreneble inter ili estas Joachim Gießner, la grava Esperantopioniro kaj fervojisto kaj lia edzino Irene. Kutime ili uzis Esperanton kiel hejman lingvon. Irene instruis dum jardekoj jogon, krome ŝi disvastigis la vegetaran kaj veganan vivstilon. Ŝi estis tre konata kaj ŝatata en Herzberg.

Se vi foje estos en Herzberg, vi povos rigardi la novajn artobjektojn en „Sinnegarten“ (ĝardeno de la sensoj). Cetere la artistino Gesine Langenkamp estas la prezidantino de Futurateliero kaj membro de Germana Esperanto-Centro. Bonvenon kaj sidiĝu por ripozado kaj meditado.

Neues, modernes Esperanto-Adressbuch im Internet erschienen!

Vielleicht werden sich einige noch an ein Projekt von Helmut Welger aus Marburg erinnern. Es handelte sich um ein „Adressbuch“ von Esperanto-Sprechern aus der ganzen Welt. Dieses Adressbuch hatte den Namen Tutmonda Esperantista Adresaro.

Nun erschien unter der Federführung der Stiftung Esperanto Internacia, einer Fachstiftung für Esperanto-Informationsarbeit und Esperanto-Unterricht, eine Netzversion mit dem Namen Tutmonda Esperanto-Adresaro. Das Internet-Adressbuch ist unter der Adresse: <http://www.adresaro.org> zu finden.

Das Adressbuch kann für vielfältige Aufgaben genutzt werden, so z. B. für die Suche nach einem Korrespondenzpartner, für die Unterstützung von Esperanto-Reisenden oder einfach nur für die Kontaktaufnahme mit Personen. Der Korrespondenzteil ermöglicht es auch, gezielt nach einem Skypepartner (Internet-Telefonie) oder nach einem Partner zum Chatten zu suchen. Auch im Reise- teil kann man nach unterschiedlichen „Helfern“ suchen, so z. B. nach

kostenlosen oder preiswerten Übernachtungsmöglichkeiten oder nach Stadtführungen. Brauchen Sie Hilfe bei der Hotelsuche oder während eines Aufenthaltes in einer fremden Stadt, oder wollen Sie sich mit lokalen Esperanto-Sprechern zwanglos auf ein Getränk treffen? Auch dann hilft Ihnen das Internet-Adressbuch.

Die Informationen im Adressbuch sind optimal geschützt. Nur für bekannte Personen, die auch finanziell einen kleinen Beitrag leisten, besteht die Möglichkeit, auch Einsicht in die Adressdaten bzw. Telefonnummern zu nehmen. Jeder Nutzer kann aber selbst festlegen, ob die entsprechenden Informationen sichtbar sein sollen.

Das Adressbuch soll nicht auf dem jetzigen Stand bleiben, Verbesserungen sind bereits jetzt geplant. So soll man z. B. auch die Möglichkeit haben, seinen Standort auf einer Karte einzutragen oder auch nach Lernpartnern oder Sprachhelfern zu suchen. Dies nicht nur für Esperanto, sondern auch für andere Sprachen. Bald soll auch nach Esperanto-Verbänden (Landesverbände, Ortsgruppen, Fachgruppen) gesucht werden können.

Das Adressbuch soll aber nicht nur Esperanto-Sprechern, sondern auch Esperanto helfen. Einerseits kann man vermerken, wenn man Esperanto in irgendeiner Form hel-

fen will (z. B. durch Übersetzungen, Plakate, Stände) und andererseits sollen kleine Esperanto-Landesverbände das Adressbuch auch für die eigene Mitgliederverwaltung nutzen können.

Insgesamt also eine runde Sache. Jetzt heißt es nur: Anmelden! Das Adressbuch kann nur funktionieren, wenn es auch Einträge gibt. Personen, die keinen oder keinen regelmäßigen Zugang zum Netz haben, können auch ein Eintragsformular erhalten. Melden Sie sich bei administrado@adresaro.org

Martin Schäffer



Unua Komenius-renkontiĝo en Bulgarujo



Dum la semajno de la 4a ĝis la 11a de novembro delegacio de sep lernantoj kaj du instruistoj de la Gimnazio Winterberg kaj Medebach vizitis la bulgaran urbon Polski Trambeŝ kaj renkontiĝis kun aliaj grupoj el Bulgarujo, Italujo, Litovujo kaj Rumanujo.

Entute pli ol 60 lernantoj partoprenis vastan labor-programon, i.a. prezentadojn de la partoprenantaj urboj kaj la historio de ties landoj. La scion de la lernantoj oni testis kaj profundigis en kvizo pri la partneraj landoj kaj Eŭropa Unio ĝenerale. Ankaŭ vizito en la urbodomo kaj interparolado kun la urbestro pri la situacio de Bulgarujo ekde la aliĝo al EU en la jaro 2007 estis en la programo.

Aldone al la laborprogramo okazis prezentaĵoj de la tre vigla folkloro en Bulgarujo, ĉefe de popoldancoj en tradiciaj kostumoj, kiuj estas tre popularaj en ĉiuj tavoloj kaj aĝgrupoj de la lando. La alta nivelo de la dancoj ravis ĉiujn spektantojn. Diversaj ekskursoj al urboj en la ĉirkaŭaĵo donis pliajn impresojn pri la historio kaj aktuala

situacio de Bulgarujo. Kompreneble ankaŭ la personaj kontaktoj de la lernantoj inter si kaj kun iliaj gastigantoj estis gravaj kaj kortuŝaj momentoj de la semajno.

La pasinta renkontiĝo estis la unua el kvar renkontiĝoj de la projekto, kiu daŭras du jarojn kaj kunigas kvin lernejojn el kvin landoj. La titolo de la projekto estas „Diversaj profesioj – ni vidu defiojn kiel ŝancojn por realigi revojn“ kaj estas financata de la EU kadre de la Komenius-programo. Ĝia celo estas prepari junulojn por la estonto en pli kaj pli kunfandiĝanta Eŭropo kaj malkreskigi antaŭkonceptojn pri alilandanoj. Lingvo de la projekto estas Esperanto, kiun la partoprenantoj lernas en siaj lernejoj kaj dum la renkontiĝoj. La komunikado dum la unua renkontiĝo post nur kelksemajna lernado kompreneble estis malfacila, sed oni rimarkis jam la altiĝon de la lingvonivelo.

La dua renkontiĝo okazos komence de majo 2013 en Winterberg/Medebach kaj ni ĝojas jam pri revido kun niaj novaj amikoj, al kiuj ni povos montri „Acidlandon“ kaj ni esperas, ke ni same bonkore kapablos gastigi ilin, kiel la bulgaroj faris kun ni.

Mortis Richard Hirsch: Meritplena vivo por Esperanto

* 20.08.1924 †17.05.2012,
portanto de la federacia meritkruc
1973 - 1992 ĝenerala sekretario de GEA
1982 - 2000 ekspedanto
de *Esperanto aktuell*.

Maljam nun Germana Esperanto-Asocio (GEA) eksciis, ke jam la 17an de majo 2012 mortis nia honora membro Richard Hirsch. Ekde la 70aj jaroj li estis unu el la plej meritplenaj aktivuloj en Germanujo, ĉiam subtenata de sia edzino Elisabeth Hirsch, kiu laŭ malcertaj informoj mortis jam antaŭ kelkaj jaroj.

Dum la 51a Germana Esperanto-Kongreso en 1973 la membrokunveno elektis en Luksemburgo Richard Hirsch estrarano kaj ĝenerala sekretario de GEA. La oficejo de GEA transiris de Augsburg al Bad Hersfeld. „Lambertstr. 12“ ekde tiam estis preskaŭ 20 jarojn la centra Esperanto-adreso en Germanujo. La kunveno ankaŭ elektis s-inon

Elisabeth Hirsch en la estraron, ĉar ŝi samjare transprenis la postenon de la Germana ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio.

En Bad Hersfeld okazis multaj estrarkunsidoj. La kelo de Lambertstr. 12 estis plena de diversa Esperanto-materialo. Richard Hirsch daŭre zorgis por novaj reklamiloj, afiŝoj, glu-markoj kaj -afiŝetoj, broĉoj kaj pingloj. Dum lia tempo ankoraŭ funkciis gratulservo de GEA, kiu mankas nun de multaj jaroj.

Richard Hirsch ne estis brila oratoro aŭ karisma gvidanto; lia virto estis sindonema, konstanta kaj fidinda honorofica laboro en la malantaŭo, bazo por la tuta agado de GEA. 19 jarojn, ĝis la 70a Germana Esperanto-Kongreso en 1992 en Schwerin, li restis sekretario kun la oficejo en Bad Hersfeld, tiam s-ro Hirsch retiriĝis. Unu jaron poste li, aĝante intertempe 69 jarojn, prave nomumiĝis honora membro de GEA, samjare ankaŭ de Universala Esperanto-Asocio

Sed „retiriĝi el la estraro“ por li ne signifis „ne plu labori“. Ankoraŭ ĝis la jaro 2000 li senlace ekspedadis *Esperanto aktuell* de Bad Hersfeld, kion nun faras firmao. Nur gravaj malsanoj povis haltigi lin. La lastajn vivojarojn li pasigis en flegejo, kie li fine ne plu povis akcepti vizitantojn, sed ankoraŭ regule legis nian revuon. En la historio de GEA li atingis sian por ĉiam restantan lokon.

Rudolf Fischer

Margret Brandenburg

* 06.08.1932 † 21.09.2012,
portanto de la federacia meritkruc

Post longa malsano mortis Margret Brandenburg, dum multaj jaroj kun sia edzo Willi Brandenburg aktiva en la loka grupo Münster. La gepatroj edukis tri denaskulojn, inter ili la nunan ambasadoron de Germanujo en Moskvo, Ulrich Brandenburg. Kiel juna patrino Margret Brandenburg gvidis rondon de Esperanto-familioj kaj eldonis la Gepatran Bultenon. En 1981 ŝi kunfondis la subtenan organizon Bona Espero por la samnoma infanovilaĝo en Brazilo. Pro siaj meritoj ŝi en 1993 ricevis la Zamenhof-medalon de Germana Esperanto-Asocio. Ŝi postlasas neŝtopeblan breĉon en Monastera Esperanto-Societo.



Margret Brandenburg kaj
Richard Hirsch post siaj
honorigoj dum la 71a
Germana Esperanto-Kongreso
en Karlovy Vary

Kalendaro

Decembro 2012

27. decembro - 3. januaro: 29-a Internacia Festivalo en Dortmund, Germanio, en moderna domo urbocentre sed en trankvila ĉirkaŭo. Kadra temo: Komputilo kaj interreto. Tuttaga ekskurso tra la Ruhr-regiono, kun vizitoj al urboj Bochum, Essen kaj Oberhausen. Plilongiga eblo ĝis 4-a de januaro. Inf: Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. Tel./fakso +49-5624-8007, portebla +49-171-4964558, Reto: *HDP(ĉe)internacia-festivalo.de*

27. decembro - 3. januaro: 11-a Novjara Renkontiĝo (NR) en Xanten (okcidente de Essen/Ruhr), Germanio. Por infanoj, familioj kaj aliaj plenkreskuloj. Ĉ. 150 partoprenantoj el deko da landoj. Prelegoj, koncerto, teatraĵo, ekskursoj. Lingvokursoj por komencantoj, konversacio - kaj bela internacia etoso. Inf.: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. Rete: *lu.esperantoland@gmx.de*

27. decembro - 3. januaro: 4-a Novjara Internacia Semajno (NIS) en Xanten (okcidente de Essen/Ruhr), Germanio. Renkontiĝo por junuloj kaj junaj plenkreskuloj, apud Nederlando kaj Belgio. Junularaj programoj, diskoteko, ekskursoj, lingvokursoj. Paralele al la „Novjara Renkontiĝo, NR“ Inf.: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. Rete: *lu.esperantoland@gmx.de*

28 - 30. decembro: 31-a Komuna Seminario en Hachioji, Japanio. Komuna Seminario estas junulara renkontiĝo inter orient-aziaj junuloj. Por pliaj detaloj vidu en Vikipedio. Inf.: Japana Esperanto-Junularo, rete: *KS2012LKK@gmail.com*

28. decembro - 2. januaro: SANO 3. La alternativa jarŝanĝa seminario en Herzberg/Sieber, Germanio. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz - la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6, Germanio. Tel: +49-(0)5521-5983, rete: *esperanto-zentrum@web.de*

28. decembro - 2. januaro: Jarfina FESTego kun Silvestra-Novjara FESTeno en Greziljono, Baugé, Francio. Amuzajoj, ludoj, prelegoj, muziko, E-kurso, konversacio - festa

etoso por ĉiu aĝo. Inf.: Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce, Francio. Rete: *kastelo@gresillon.org*

28. decembro - 4. januaro: 4-a Junulara E-Semajno (JES) en Naumburg (Saale), Germanio. Inf.: *http://jes.pej.pl/2012*

Januaro 2013

10 - 16. januaro: Jarkongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio en Auckland. Eksterlandaj instruistoj estas invitotaj. La programo enhavas ekskurson en la belan pejzaĝon de Auckland. Inf.: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, New Zealand Esperanto Association, P.O. Box 8140, Symonds Street, Auckland 1150, New Zealand. Telefono: 0800 350 781. Rete: Chris Krageloh, *chris.krageloh@gmail.com*

12 - 19. januaro: Montara Karnavalo en Zagórze Śląskie (60 km for de Vroclavo) en Pollando. Inf.: Bjalistoka Esperanto-Societo, Elżbieta Karczewska *esperanto.bialystok@interia.pl*, tel.: +48.791 856 034

18 - 21. januaro: 8-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado en Iksan, Koreio. Esperantista Asocio de Ŭonbulismo okazigos enhavriĉan renkontiĝon kun diversaj programoj, en kiu oni povas praktiki meditado, fari komunan ekskurson al vizitindaj lokoj, sperti korean kulturon, ekkoni pri Ŭonbulismo kaj tiel plu. Inf.: Esperantista Asocio de Ŭonbulismo, Iksan, Koreio. Rete: *esperanto@saluton.net*

18 - 22. januaro: 48a Brazila Esperanto-Kongreso en Barra do Garças, MT Brazilo. Ĉeftemo estas „Esperanto, Kulturo kaj Turismo: Alternativoj por verda ekonomio“. Inf.: Brazila Esperanto-Ligo, Rua Manoel Oleiro, 93/A, Jardim Piracema, Barra do Garças, MT, Brazilo, CEP 78600-000. Tel. +55(66) 3401-7782 / 9899 / 5203. Portebla +55(66)9979-6005. Rete: *cyrusgofre@gmail.com*

25 - 27. januaro: Internacia Festivalo de Maskaradaj Ludoj - „SURVA“ en Pernik (30 km-ojn de Sofio). Bulgaraj organizantoj atendas viziton de eksterlandaj esperantistoj. Inf.: UPIEK, BG-1202 Sofio, Bulv. „Slivnitsa“, No. 204, Bulgario. Rete: *lasto@mail.bg*

Februaro 2013

22 - 24 februaro: Drondo (diskutrodo por progresintoj) en Shallowford House

Staffordshire, Britio. Semajnfina Esperantlingva diskutrodo (por progresintoj) pri diversaj temoj. Inf.: Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Rete: *eab@esperanto.org.uk*

24. februaro: Ekspozicio pri Esperanto en Nankana Sahib, Pakistano. La 2a Ekspozicio pri Esperanto „Lingvo kaj Kulturo“ inkluzive renkontiĝo okazos en Nankana Sahibo per Pakistana ILEI-sekcio kaj Junulara Esperantista Pakistana (JEP). Inf.: ILEI-pk kaj JEP, Ward No. 11, Near M. C. High School, Nankana Sahibo. Rete: *ilei.pk@gmail.com*

26. februaro - 11. marto: 10-a Internacia Himalaja Renkontiĝo en Katmandu, Nepalo. Inf.: Nepala Esperanto-Asocio, G.P.O Box: 10518 Kathmandu, Nepal. Telefono: +977-1-6209877. Rete: *nespa.1990@gmail.com* aŭ *luno1962@gmail.com*

Marto 2013

13. marto - 17. marto: Bibliaj Tagoj kun Adoru 2013 en Strasbourg, Francio. Inf: Stefan Lepping, Mellinstr. 5, 59457 Werl, Germanio. Retadreso: *stefanlepping@gmx.de*. Telefono: (+49) (0)2922/9287098. resp. (0)174/6165428 (nur en urĝaj kazoj).

25. marto - 1. aprilo: Printempa Semajno Internacia (29-a PSI) en ST. Andreasberg (Harz), Germanio. Programo kun prelegoj, ekskursoj kaj diversaj kursoj kaj vizito de la paska leporo. Infanoj kaj junuloj havas sian propran programon. Inf.: *psi@esperanto.de*

Majo 2013

17 - 20. majo: 90a Germana Esperanto-Kongreso en Nürnberg, Germanio. Kongreso de GEA kaj festo okaze de la 125-a jubileo de la Nuernberga Esperanto-grupo. Inf.: Esperanto-Nürnberg (Sabine Hauge), Moritzbergstr. 37, DE-90482 Nürnberg, Germanio, *esperantonord@googlemail.com*

Oktober 2013

6 - 11. oktobro: 3a Esperantista Migrado Aŭtuna en Zell/Mozelo, Germanio. Migrotagoj kun vidindaĵoj en mezmontara vinregiono de Mozelo kun panoramejoj, burĝoj, ktp. (nur 30 lokoj!). Inf.: Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, Germanio. Rete: *wolfgang.bohr@esperanto.de*

Multjara subteno de germanaj esperantistoj en Benino

La lernejo Jules Verstraeten fondiĝis en la jaro 1999. Jules estis belga esperantisto kaj adoptita patro de la iniciinto de la lernejo, Jean Codjo. Jules forpasis antaŭ kvar jaroj. Vi nun certe povas diveni kial la lernejo nomiĝas Jules Verstraeten. Sed, la konstruado de tiu lernejo fakte eblis ĉefe per helpo de germanoj, interalie la dangermana familio Hauge.

Germanoj ne nur kontribuis al konstruado de la lernejo, sed ankaŭ al subteno de ties geknaboj kiuj, post la bazgrada nivelo, daŭrigas en la gimnazio kaj poste en la universitato. La Fondaĵo Mondo de Martin Schäffer estas unu el la ĉefaj subtenantoj de la geknaboj. Nun en septembro 2012, la lernejo produktis



La tago, kiam Marko H., plena vegano, tute ĉesis manĝi!

Dio mia, tiuj doloroj! Aaaaah!

Damnita bruto! Aaaargh!



© mil, <http://mycartoons.de/>

la tutunuan universitatan studenton, nome Norbert Sadohoundé. Kiel knabo li estis fotita en la jaro 1999, kun propra seĝeto ĉemane, survoje al lernejo. Post deko da jaroj, la lernejo iĝas pli kaj pli moderna, kaj la tieaj geknaboj, pli kaj pli feliĉaj. Sed, sen helpo de bonkoraj mecenatoj, tiuj geknaboj certe ne kapablos daŭrigi sian studadon ĉe la duagrada lernejo kaj ĉe la universitato. 100 eŭroj sufiĉas por studi tutan jaron ĉe la regiona duagrada lernejo, sed por la universitato la kosto estas tre alta laŭ la loka vivnivelo, ĉirkaŭ 50 eŭroj monate, sume 600 eŭroj jare. Kompreneble lokuloj apenaŭ kapablas pagi tian sumon por sendi iun al universitato. Danke al helpo de la Fondaĵo Mondo, Norbert Sadohoundé estas nun kapabla daŭrigi studadon ĉe la universitato en la plej granda benina urbo, Kotonuo. Dum la venontaj jaroj, aliaj geknaboj sukcesos enirekzamenon al la universitato kaj bezonos subtenon por studi tie. Bonvolu sendi helpojn ĉiuspecajn al la Fondaĵo Mondo, se vi loĝas en Germanio laŭ jenaj informoj:

Stiftung Mondo
Konto-Nummer: 151 100 004
Bankleitzahl: 600 901 00
Bank: Volksbank Stuttgart
Projekt E1 (Schule in Codji)

13a KEKSO en Potsdam





Sehr geehrte Damen und Herren, liebe Esperantisten

Wir begrüßen Sie recht herzlich zur letzten Ausgabe der kune in diesem Jahr und freuen uns, Ihnen mitteilen zu dürfen, dass unsere Redaktion Zuwachs erhalten hat: ein enthusiastischer junger Mann mit Namen Jarno Riefer hat sich bereit erklärt - beginnend mit der nächsten Ausgabe - der kune einen Teil seiner Arbeitskraft zur Verfügung zu stellen. Eine ausführliche Vorstellung wird entsprechend folgen.

Wie so vieles andere hat sich dies aus der letzten Vorstandssitzung heraus entwickelt, zu der es in dieser Ausgabe noch einen detaillierteren Artikel gibt. Auch freuen wir uns, dass Carl Bauers Beinahe-Streitschrift

tin der Ausgabe 04/2012 und die Reaktionen darauf immer noch im Gespräch sind – in dieser Ausgabe ein weiterer Leserbrief.

So uns jemand eine Rückmeldung geben möchte für das nun vergangene Jahr, Verbesserungsvorschläge für das kommende Jahr oder generell etwas zu dem Thema kune zu sagen hat, so möge er oder sie einen Elektrobrief an kune@esperanto.de verfassen. Oder uns beim JES zu einem Bier einladen, wahlweise...

Hochachtungsvoll,

Caroline und Miriam
(und bald auch Jarno)



2. Vorstandssitzung der Deutschen Esperanto-Jugend 2012

Getroffen haben wir uns dieses Mal in der Hauptstadt, in der anheimelnden Bundesgeschäftsstelle von DEB und DEJ, dem BerO. Ein Wochenende lang (vom 9.-11.11.12) ging es ums Ganze – wie wurde umgesetzt, was wir uns bei der letzten VoSi vorgenommen hatten? Welche Probleme und Erfolge gab es? Wie steht es generell um Verein und Vorstand?

Besprochen wurden Finanzen, Website, Mitgliederverwaltung, Organisation von Treffen, Situation der Mitgliederzeitschrift, geplante Satzungsänderungen, die Nachwahl von Vorstandsmitgliedern und mehr. In der gemeinsamen Sitzung mit dem Vorstand des Deutschen Esperanto-Bundes konnten Pläne zur Erweiterung der Zusammenarbeit gefasst werden und die Zukunft gemeinsamer Projekte besprochen werden.

Traditionell gibt es immer 2 Vorstandssitzungen im Jahr, eine geschlossene, nur für gewählte Mitglieder des Vorstands, und eine offene, zu der an der Vorstandsarbeit Interessierte gerne eingeladen sind. Da es sich bei dieser VoSi um letztere handelte, waren außer den üblichen Verdächtigen Carl, Leo, Alexander, Clemens und Miriam noch Max, Jarno und Janot da, welche

denjenigen unter euch, die es zur Jahreshauptversammlung am 31.12.12 in Naumburg zieht, zumindest teilweise noch begegnen werden – da werden nämlich die Nachwahlen für den Vorstand stattfinden (also kommt zahlreich – es gibt auch Kekse).

Möchtest du es noch genauer wissen und erfahren, wie dein Mitgliedsbeitrag in Vereinsarbeit umgesetzt wird? Dann melde dich bei kune@esperanto.de und fordere das vollständige Sitzungsprotokoll an.

Interessierst du dich für Vorstands- und Vereinsarbeit, und spielst mit dem Gedanken, dich zu beteiligen? Schreib an gej.fe@esperanto.de, neue Aktive sind immer gern gesehen.



Aus der DEJ-Vorstandssitzung in Berlin. Foto: Hedwig Fischer

KEKSO in Potsdam

Vom 19. bis 21. Oktober trafen sich zum 13. Mal motivierte Jugendliche im Rahmen des KEKSOs, um Esperanto zu lernen, dieses Mal in Potsdam.

Ein Wochenende (Freitag bis Sonntag) dauerte das KEKSO. Es ist ein Treffen der DEJ speziell für Jugendliche, auch für solche, die noch kein oder nur wenig Esperanto sprechen. Aufgrund des vergleichsweise hohen Niveaus der Teilnehmer (fast alle hatten mindestens schon einmal an einem Kekso teilgenommen) entfielen dieses

Mal die Sprachkurse. Stattdessen haben wir ein eigenes Hörspiel auf Esperanto geplant und umgesetzt. Ausgewählt wurde das Märchen „Die sieben Geißlein“ (La sep kapridoj) der Gebrüder Grimm. Spaß gemacht hat es auf jeden Fall - wer sich vom Ergebnis selbst überzeugen lassen will, schickt einfach eine E-Mail an jarno.riever@esperanto.de.

Außerdem unternahmen wir, unter fachkundiger Führung von Jacob Migenda, einen Rundgang durch die schöne Stadt Potsdam. Aber auch außerhalb des offiziellen Programms wurde es natürlich nicht langweilig. Spiele, Musik und Diskussionen bis spät in die Nacht gehörten zur Tagesordnung. Wir hatten sogar ein Klavier zur Verfügung und einen Raum, den wir bis spät in die Nacht nutzen konnten, ohne jemanden zu stören – perfekte Bedingungen.

Das nächste KEKSO wird voraussichtlich vom 17. bis 20. Mai 2013 in Nürnberg stattfinden, weitere Informationen dazu bald unter <http://esperanto.de/dej/kursoj/kekso/>.

Jarno Riever



DEJ- und D.E.B.-Aktive bei einer gemeinsamen Sitzung in Berlin. Foto: Hedwig Fischer

Sächsisches Kennenlernetreffen

Ob nur vom Namen oder vom Hörensagen her - oft wissen oder vermuten wir, dass es in der Nähe andere Esperantisten gibt. Persönlich kennen wir aber bei weitem nicht alle.

Deshalb trafen sich im Oktober junge Esperantisten aus Sachsen unter dem Motto „NI INTERKONATIĜU!“ In der Stadt Leipzig fanden sie sich zusammen, um gemeinsam einen tollen Tag zu verbringen und sich gegenseitig kennen zu lernen. Neben Filmgucken, Werwolf- und Psychospielen wurde vor allem viel geplaudert. Angefangen mit einem Spaziergang durch die Leipziger Innenstadt, endete der Tag mit einem Abendessen in der berühmten Leipziger „Karli“.

Gerade für diejenigen, welche ihr erstes (großes) Esperanto-Treffen noch vor sich hatten, war das eine super Möglichkeit, um in Esperantujo Fuß zu fassen.

Auch wurde viel ausgetauscht, was die Erfahrungen und

Aktivitäten der Ortsgruppen angeht. So soll zum Beispiel in Dresden künftig ein Stammtisch für junge Esperantisten entstehen, wie es ihn in Leipzig gibt.

Es war ein Erfolg und eine gute Grundlage für weitere Treffen, die – auch über die Grenzen Sachsens hinaus – folgen sollen.

Alexander Kozak



Leserbrief zu „Stoppt die Esperanto-Krise“

Federico Faccio Peláez hat in seinen Ausführungen viel Widersprüchliches geschrieben. Richtig ist wohl, dass Organisationen (und nicht Esperanto) in der Krise sind. Fraglich ist aber, ob man Esperanto besser verbreiten kann, indem man die Organisationen abschafft.

Entgangen ist Herrn Peláez, dass unsere heutige Gesellschaft die Vereinsstruktur geschaffen hat, damit Menschen sich für Ziele einsetzen können, wobei Verantwortung, Rechte und Finanzen demokratisch geregelt sind. Die Deutsche Esperanto-Jugend muss schlicht ein Verein sein, um staatliche Gelder zu bekommen, und ohne Geld läuft eben nichts, und da alles von der Mitgliederzahl abhängt, muss sie auch Mitglieder werben.

Herr Peláez schreibt: „Für Kekso könnten ganz einfach und günstig Hunderte von Plakaten und Tausende von Flyern gedruckt werden.“ Ganz einfach! Für Plakate und Flyer braucht man Werbefachleute und Grafiker. Und woher soll das benötigte Geld, wenn nicht von den Mitgliedern einer Organisation, aus deren Kasse kommen? Weiter: „Diese kann man dann hilfsbereiten Esperantisten oder sonstigen Freunden in der ganzen Region oder darüber hinaus zukommen lassen, damit diese in ihren Universitäten, Bäckereien, Kirchen, Sportvereinen usw. aufhängen und verteilen.“ Die flächendeckende Verteilung von Material setzt (abgesehen von den Versandkosten) eine Adressdatenbank voraus, die man erst einmal schaffen und dann dauernd pflegen muss. Da ist es nicht mit E-Mails getan. Ich weiß nicht, wie solche größeren Aktionen längerfristig und kontinuierlich außerhalb von Organisationen, ohne Geld, ohne Unkostensatz usw. von Ehrenamtlichen durchgeführt werden könnten. Für Schüler und Studenten so nebenbei ist das jedenfalls nichts.

Hinter allem, was so locker wie eine Nicht-Organisation aussieht: lernu.net, E&I, usw. stecken firmenähnliche Strukturen, die für die Deutsche Esperanto-Jugend nicht in Frage kommen, weil man dafür Hauptamtliche und besondere Geldquellen braucht. Ohne die millionenschwere Stiftung ESF gäbe es lernu.net nicht und E&I wahrscheinlich auch nicht.

Hinter EsperantoLand steckt selbstverständlich ein eingetragener Verein. Ohne Geld gibt es keine einzige In-

ternetseite, keine Reklame, kein Lehrbuch, keine größere Veranstaltung. Wenn jemand weiß, wie man das alles ohne Organisation kontinuierlich sichern kann, der sollte das durch die Praxis nachweisen.

Rudolf Fischer

Neuer Netzauftritt wird freigeschaltet

Wie bei der gemeinsamen Vorstandssitzung des Deutschen Esperanto-Bunds und der Deutschen Esperanto-Jugend besprochen, wird die gemeinsame Seite www.esperanto.de ab dem 15.12.2012 in neuem Glanze erstrahlen. Vorbei also die Zeiten, als man sich nicht traute, seinen Freunden von Esperanto zu erzählen, damit sie nicht aus Versehen auf der Homepage von Esperanto in Deutschland landen... Neben einem neuen, zeitgemäßen Stil wird es auch aktualisierte Inhalte und eine übersichtlichere Bedienung geben. Die Seite der DEJ findet sich dennoch wie gewohnt unter www.esperanto.de/dej.

·kune· estas la komuna membro-gazeto de la Germana kaj de la Aŭstria Esperanto-Junularo (GEJ kaj AEJ). Ekde 2011 ĝi aperas kiel interna revueto de *Esperanto aktuell*.

Korespond-adreso: Miriam Hufenbach, Carl-von-Ossietzky-Straße 55, 09126 Chemnitz, Germanio.

Retpoŝto: kune@esperanto.de

TTT: <http://www.esperanto.de/kune>

Estraro de GEJ:

Prezidanto: Carl Bauer

Pliaj estraranoj: Liesa Marie Alfier, Clemens Fries, Miriam Hufenbach, Alexander Kozak, Alina Labitzke kaj Leo Sakaguchi

Adreso de GEJ:

Deutsche Esperanto-Jugend e.V.

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, Germanio.

Tel.: +49 30 42857899

Retpoŝto: dej@esperanto.de

TTT: <http://esperanto.de/dej>

Roman Dobrzyński: DIE ZAMENHOFSTRASSE

DIE ZAMENHOFSTRASSE besteht aus einer Vielzahl bewegender Gespräche zwischen dem polnischen TV-Journalisten Roman Dobrzyński und dem international renommierten Bauingenieur Dr. Louis Christophe Zaleski-Zamenhof (geb. 1925), dem Enkel des Schöpfers der Plansprache Esperanto. Entstehung des Esperanto sowie die Geschichte und die Zukunftsperspektiven der Esperantobewegung sind wesentliche Themen dieser Gespräche, aber Zaleski-Zamenhofs vielfältige Interessen, seine enzyklopädische Bildung und sein an dramatischen Ereignissen reiches Leben führen die Dialogpartner immer wieder zu faszinierenden biographischen, fachwissenschaftlichen und weltanschaulichen Exkursen.

Bei der Lektüre dieses Buches hat mich – neben der Fülle interessanter Daten, Fakten und Anekdoten – eines besonders beeindruckt: Der Augenarzt Dr. Ludwig L. Zamenhof (1859 – 1917) war ein echter Philanthrop und ein begeisterter Verteidiger der Menschenrechte. ... Besonderes Lob gebührt dem Übersetzer, dem es gelungen ist, die durch die Vielfalt der Themen nicht geringen Schwierigkeiten der Terminologie zu meistern.

Dr. Nikolaus Groß, Latinist

„Über das Warschauer Ghetto habe ich Vieles gelesen, aber die Erinnerungen des Enkels ermöglichen einen Zugang und ein Verständnis ganz anderer Art dieser schrecklichen Zeit. Ich bin sicher, dass das Buch gut angenommen wird.“
Dr. Ulrich Lins, Historiker

„Es ist wirklich brilliant. Mir gefällt der glatte und sehr lesbare Stil. Ich fand eine Menge interessanter Dinge, die tatsächlich Antworten auf mehrere heikle Fragen geben.“
Prof. Humphrey Tonkin, Literaturwissenschaftler

Roman Dobrzyński, geb. 1937 in Warschau. Er studierte Rechtswissenschaft und Journalismus. Für den polnischen TV-Sender Kanal 1 drehte er eine Vielzahl von Dokumentarfilmen. „Zamenhofstraße“ wurde aus dem Esperanto in elf Sprachen übersetzt.

Der Übersetzer Michael J. Scherm, geb. 1945 in Karlshuld, war Lehrer an allgemeinbildenden Schulen für Recht, Wirtschaft, Geographie und Ethik. Seit 1979 unterrichtet er Esperanto.

Agenda-Verlag, Münster, 326 S. Taschenbuch, 19,95 €, ISBN 3-89688-485-9

Bestellung per Brief, telefonisch (06136/46232) oder Netzpost: wolfgang.schwanzer@esperanto.de

Ich bestelle:

Menge	Titel	Einzelpreis	Gesamtpreis
	Die Zamenhofstraße	19,95 €	

Bitte beachten: Zum Warenwert kommen die Versandkosten zwischen 1,50 € und maximal 4,00 € hinzu. Bei Bestellungen über 70,00 Euro werden innerhalb Deutschlands keine Versandkosten für Standardsendungen berechnet. Für ordentliche Mitglieder des Deutschen Esperanto-Bundes ist die Lieferung schon bei 1 Exemplar versandkostenfrei, befristet bis 31.3.2013. Bitte hier die Mitgliedsnummer eintragen: _____

Name, Vorname:	Bitte senden an
Straße:	Dr. Wolfgang Schwanzer
PLZ, Ort:	Pfarrer-Seeger-Str. 9
Datum	55 129 Mainz
Unterschrift	

Roman Dobrzyński

DIE ZAMENHOFSTRASSE

